

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 18, Majo 2019



*Feskekôrka - ne preĝejo, sed vendhalo*

*Al la tuta mondo:*

***Bonvenon al la **verda** Gotenburgo !***

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)

## Enhavo

Enhavo.....	2	SYRE (= oksigeno) – revuo por gotenburganoj, kiuj volas ŝanĝi la mondon. 23	
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Gratulon Gotenburgo, en 2021 vi estos 400-jara!..... 24	
Espe-Porko meditas .....	3	Gotenbura Kanto! .....	27
La majfesta floro – Majblomman.....	3	”Feskekörka” .....	28
Ĉiuj majfestaj floroj 1907 – 2019 .....	4	Savu la Fiŝvendhalon.....	29
”Savu la erinacojn!” .....	4	Res med Esperanto i bagaget .....	29
Göteborgsvarvet – Kurkonkurso kun ĉirkaŭ 40 000 partoprenantoj .....	5	Fiŝoj kaj aliaj bestoj en maroj kaj lagoj .....	30
Europadagen 9 maj 2019 .....	6	Sjömagasinet.....	31
Voĉdonrajto por virinoj en Svedio leĝo ekde 24 majo 1919.....	6	Silvertärnan.....	32
La kontaktoj kun Gdansko daŭras.....	7	Alfred Nobel – la maljuna inventisto!.....	32
Jagoda Greger al Esperanto Sopot /el Facebook .....	7	INVENTOJ faritaj de svedoj .....	33
Esperanto-Sabato la 4an de majo. Lasse Granat prelegis pri velŝipoj. ....	8	Östen Mäkitalo kaj la mobiltelefonio .....	34
Velŝipoj.....	10	C. E. Johansson kaj la mezurnormpecoj .....	35
Ni Hisu La Velojn .....	11	Vi vandrar i Vättlefjäll och deltar i en samisk gudstjänst på Pingstdagen .....	36
Esperanto-Sabato 18 majo. Inga Johansson informas. ....	12	Jesu första lärjungar var fiskare.....	37
Esperanto för alla! poemo de Monica Eissing.....	14	Pri fizika scienco kaj la anima scienco de Martinus.....	38
La konsila tago de lingvoj – Språkråds- dagen 2019.....	15	Esperanto-kursoj en julio kaj aŭgusto en la franca kastelo Gresillon .....	40
Pentti Käppi rakontas pri migradoj en Karelio .....	19	Emílio Cid turnas sin al personoj, kiuj decidas pri la lernejoj programoj.....	41
		Anekdotoj el 1904.....	41

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadvägen 68. La eldonfrekvenco estas neregula.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com)  
kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32,  
[ingegerd.granat@telia.com](mailto:ingegerd.granat@telia.com). Fina paĝaranĝo: Andreas  
Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).





## Espe-Porko meditas



- ☼ Sur la unua paĝo estas bildo pri Feskekörka, kiu ne estas preĝejo, sed vendhalo. Ĝi estos riparita, sed post tio multaj timas ke aliaj aktivecoj prenos lokon en lokalo. Pro tio oni grupiĝas por savi "Feskekörkan"
- ☼ Abundas specialaj tagoj en majo: **1 majo** – la tago de laboristoj, **6 majo** – Ramadan komenciĝas, **9 majo** – la Eŭropa tago, **15 majo** – La konsila tago de lingvoj, **18 majo** – la kurkonkurso Göteborgsvarvet, **24 majo** – 100-jarjubileo de la leĝo pri voĉdonrajto por virinoj, **26 majo** – voĉdono pri kandidatoj al la EU-parlamento, **29 majo** – la Veterana tago, **30 majo** – Tago de Ĉieliro kaj la komenco de la SEF-kongreso. En la almanako ankaŭ estas notita **17 majo** – la Nacia Tago de Norvegio. Ĉu mi forgesis ion?
- ☼ Ĉi tiun monaton estis **du** Esperanto-Sabatoj kun interesa enhavoj.
- ☼ Minoritaj lingvoj interesas nin. Nun estas la vico de la finna kaj vi nun havas kontakton kun La Gotenburga Societo de Finnaj Militinfanoj. Unue Kielo Bengtsson kaj Pirkko Loippo de la estraro vizitis nin kaj parolis pri la problemoj ŝanĝi lingvojn dufoje.

- ☼ La duan fojon ni – kvar personoj – vizitis ilian klubon kaj aŭskultis prezentadon de Pentti Käppi pri la vivo en Karelio dum la milito kaj la migrado de refuĝintoj.
- ☼ Ni trovis sufiĉe novan Gotenburgan revuon: Syre – Oksigeno. Estas interese por "gotenburganoj, kiuj volas ŝanĝi la mondon". Aŭtune la redaktoro eble venos por prelegi por ni pri eldonado de revuoj. Bone por Ora Ĵurnalo!
- ☼ Ne nur la universala ŝraŭbŝlosilo estas invento de svedo – ne troviĝas pliaj. Legu!
- ☼ Ĉar ne estis demando ĉu ni volus reprezenti SEFon en la Libro-Foiro en septembro, la Gotenburga Societo mem mendis sin kaj pagos por la partopreno. Kompreneble ni servos al la vizitantoj de la tuta Svedio ekz. per informo pri aliaj kluboj.
- ☼ Se vi volus partopreni en la kvin-taga kurso en Karl Gustavsgatan 15, Gotenburgo, vi aliĝu per pago de la kotizo al la Nordea pg: 4 36 12–1. Pliaj informoj en la fino de ĉi tia numero.
- ☼ Pli kaj pri veganaj kaj vegetaraj restoracioj nun troviĝas. Bone por mi!

Espe-Porko /Siv

## La majfesta floro – Majblomman



Ĉiun jaron infanoj per konkurso decidas kiun koloron la ĉi-jara maj-festa floro havu. La nomo de la gajninto en 2019 estas Saga. Ja floro similas al blanka anemono, ĉu ne?

Gelernantoj kaj skoltoj vendas la artefaritan floron dum du semajnoj en aprilo kaj la mono iras al infanoj kiuj bezonas ekstran apogon. En 1907 oni fondis Förstamajblommans riksförbund en Gotenburgo La iniciinto estis Beda Hallberg, kaj ŝi vere sukcesis. En Göteborgs Handels- och Sjöfartstidning ŝi skribis en majo 1907:

(iomete mallongita) *“La blua floro vere gajnis venkon. La tuta urbo honoras ĝin. Ĉie oni vidas la floron sur paltoj, manteloj, koltukoj kaj ŝaloj. Vendistoj, oficistoj, laboristoj, la maljunulo, la infano, la konduktoro de la*

*tramo, la policisto, la veturigisto – ĉiuj portas la floron kaj sentas ĝojon por partopreni en la afero. Estas la idealo inter ideoj: simpleca, entuziasmiganta kaj donanta.” /Siv*

## Ĉiuj majfestaj floroj 1907 – 2019



## ”Savu la erinacojn!”

estis admono antaŭ la 30a de aprilo, la Valpurga antaŭvespero (Göteborgs-Posten)

Kelkaj amasoj da branĉetaĵoj kuŝis netuŝitaj post la aŭtuno, atendante fariĝi Valpurga festofajro Erinacoj ofte trovas, ke la branĉetaro estas perfekta loĝejo.

Erinacoj ne forkuras kiam komencas bruli kaj estas varme. Male ili kaŭras kaj restas en la loĝejo – kaj forbruliĝas.

Ankaŭ birdoj, ekz. rubekoloj kaj fringoj povus konstrui siajn nestojn en branĉetaĵoj.

Plej bone estas translokigi la branĉetaron kelkajn metrojn. Se ne eblas, prenu longan bastonon kaj movi ĝin en la branĉetaro. Ĉu vi aŭdas sonon? Ĉu estas signo de vivo?

Entempe antaŭ la festo – prenu kontakton kun la aranĝanto kaj demandi pri la sekureco de ev eventualaj bestoj en la branĉetaro.





## Göteborgsvarvet – Kurkonkurso kun ĉirkaŭ 40 000 partoprenantoj

La konkurso similas al Vasaloppet kun densa grupego en la komenco sed pli maldensa en la fino. La konkurso okazis la 18an de majo.

Kiel kutime Kenianoj kaj aliaj Afrikanoj venkis. La distanco estas 20 kilometroj.



## Europadagen 9 maj 2019

# EUROPADAGEN

## 9 MAJ 2019

#Europadagen



/sweden/file/europadagen2019png\_sveuropadagen\_2019.png

På Europadagen den 9 maj firar hela Europa freden och sammanhållningen i Europa. Det är också ett tillfälle för diskussion om EU:s framtid. Det är så många dagar som är speciella dagar under året. Hur märktes det i Sverige? Vi i Göteborg missade dagen totalt.

Och den **26 maj** är det **val till EU-parlamentet**. Massmedia gör allt för att vi

ska lära känna de olika partiernas kandidater – men ändå klagar vi och säger att vi inte fått tillräcklig info.

**Vi i Göteborgs Esperantoförening har skickat den skrivelse vi på sista sidan presenterade i förra numret till partiernas toppkandidater om Esperanto i EU. Vi får väl se om den gör någon nytta. /Siv**

## Voĉdonrajto por virinoj en Svedio leĝo ekde 24 majo 1919



La "sufrageto" Signe Bergman 1910.

el Wikipedia

**Signe Wilhelmina Ulrika Bergman** estis unu el la plej aktivaj en la sveda organizo: Landsföreningen för kvinnans politiska rösträtt (LKPR), kaj ŝi estis ties prezidanto 1914–1917.

La voĉdonrajto por virinoj igis grandan debaton fine de la 19a jarcento. En 1884 estis farita propono, sed la parlamento malaprobis ĝin per la ciferoj 53 kontraŭ 44. Nova leĝpropono estis farita en 1912 kun la sama malbona rezulto.


**Nur en 1919 la parlamento aprobis ke virinoj havu voĉdonrajtojn, kaj en la elekto al la Dua Ĉambro en 1921 virinoj por la unua fojo povis voĉdoni.**

Fakte kelkaj virinoj havis limitan voĉdonrajton 1718 – 1772, t.e. dum la Libereca tempo (frihetstiden).

**La 24an de majo Göteborgs-Posten atentis la 100-jaran leĝon. La rubriko estas: "La rajton voĉdoni la virinoj venkis per broŝuroj, ne bomboj". Ulrika Knutson rakontas pri virinoj kiel Elin Wägner kaj Frigga Carlgren. Frigga aranĝis la solan manifestacian marŝon por virina voĉdonrajto en Svedio. Ĝi okazis en Gotenburgo en 1918.**



# La kontaktoj kun Gdansko daŭras



*Fine de aprilo Sten Svenonius denove vizitis la urbon. Jen kun Lucina.*

## Sten Svenonius skribis:

Dum vizito en Pollando mi pasigis kelkajn horojn en Gdansk kaj renkontis miajn amikojn Elwira kaj Lucina. Ili estas konataj al svedaj esperantistoj pro sia kunlaboro pri la sveda kongreso en Gdansk 2016 kaj pro sia partopreno en someraj kursoj en Gotenburgo. Estas tre agrable esti

akompanata de amikoj en tamen fremda loko kun fremda lingvo. Elwiran ni renkontos denove en Gotenburgo dum la someraj kursoj.

**Sten Svenonius**

## Jagoda Greger al Esperanto Sopot /el Facebook



3 maj kl. 16:38

La Foto raporto de la hodiaŭa vizito. Mankas momente la komenca aspekto de nia arbara herbejo. Post la granda purigado, ni manĝis oranĝojn anstataŭ drinki vinon (je la sano de la kverko), ĉar la Prezidanto de Sopot petis neregistaraj organizaĵojn rezigni de plastikaj ujoj (por helpi protekti la naturon). Jes, kompreneble, sed tuj ekmanĝis kantemon. 😊



## Esperanto-Sabato la 4an de majo. Lasse Granat prelegis pri velŝipoj.

### Lite grand om segelfartyg

I början tillverkades fartygen av enkla trästockar. Ett tygstycke hölls uppe i luften. Det gällde då att det var rätt vindstyrka och blåste i rätt riktning.

Fenicierna konstruerade båtar med köl 3000 år f. Kr. och klarade då andra vindar än medvind.

Stora havsgående fartyg kom på 600-talet e. Kr. De var enmastade och med råsegel. Vid fel vind fick man ro. Det tog tid.

På medeltiden blev det större och bättre transporter. Fartygen gick med passadvindar eller stora havsströmmar. Det blev stora skepp med flera master. Fullriggare med 3–5 master!

Det blev mer praktiskt med modernare riggar med snedsegel och bommar. Då kunde vinden fångas både från sidan och snett framifrån. Även barkar hade ett gaffelsegel i aktern med snedsegel ovanför.

Skonare hade bom längst ned under alla de stora seglen. På "Marylandsskonare" låg bommarna nära däcket och kallades för

### lomete pri velŝipoj

Komence oni konstruis ŝipojn el simplaj trunkoj. Peco da teksaĵo estis levita en la aero. Gravis ke estis la ĝusta ventopovo kaj ke blovis en la ĝustan direkton.

La fenicoj konstruis boatojn kun kiloj, 3000 jarojn antaŭ Kristo kaj regis aliajn ventojn ol favoraj ventoj. Grandaj marirantaj ŝipoj ekis en la sepa jarcento post Kristo. Ili estis unumastaj kaj kun kvadrata jardvelo. Je malfavora vento oni devis remi. Estis temporabo.

En la mezepoko fariĝis pli grandaj kaj pli bonaj transportoj. La ŝipoj iris per pasataj ventoj aŭ per grandaj marfluoj. Fariĝis grandaj ŝipoj kun pluraj mastoj. Plenrigitaj ŝipoj kun tri – kvin mastoj!


Estis pli praktike kun modernaj rigoj kun oblikvaj veloj kaj bumoj. Tiamaniere oni povis kapti la venton kaj de la flanko kaj oblikve frontrigarde. Ankaŭ barkoj havis gafovelon en la pobo kun diagonalaj veloj supre.

Skunoj havis bumon plej malsupre sub ĉiuj la grandaj veloj. En "Marylandskunoj" la bumoj



”mankiller”. Nu kunde man segla i motvind också. Då kunde man färdas i trånga sund och skärgårdar och i hamnar.

På 1920-talet började ångbåtar konkurrera med hastighet och med mindre besättning.



*Lasse rakontas pri velŝipoj*

kuŝis proksime al la ferdeko kaj nomiĝis ”mankiller”. Nun oni povis veli ankaŭ kontraŭ la vento. Do oni povis veturi en mallargaj markoloj, en insularo kaj en havenoj.

En la 1920 jardeko vaporŝipoj komencis konkuri per rapideco kaj per malpli da ŝipanaro.



*Ni cerbumas... velirado estas komplika afero*



# Velŝipoj



Skuno

Kelkaj boatoterminoj kiuj troviĝas en la teksto :


<i>antaŭmasto</i>	la plej antaŭa masto sur plurmastitaj velŝipoj
<i>antaŭvelo</i>	velo antaŭ la antaŭa masto
<i>boardo</i>	veliri kontraŭ la vento helpe de zigzaga direkto
<i>bumo</i>	stango kiu streĉas la suban flankon de velo
<i>gafo</i>	ronda stango kiu klinas malantaŭen kaj supren de el la masto.
<i>gafvelo</i>	gafvelo alfiksiĝas je gafo supre kaj je bumo malsupre.
<i>jardo</i>	horizontala stango kiu portas kaj streĉas la supran flankon de velo
<i>ĵibo</i>	antaŭvelo inter kapstango aŭ ĵib-bumo kaj la plej suba mastjunto
<i>kapstango</i>	elstara konstruo antaŭ la steveno por antaŭmaststajo kaj antaŭveloj
<i>mesa masto</i>	postmasto sur barko
<i>meso</i>	gafvelo je la mesa masto
<i>nodo</i>	unuo por rapido surmare. Unu nodo signifas unu maran mejlon (1852 metroj) po horo. La termino devenas de tio ke oni kalkulis la rapidon helpe de elglitiĝa ŝnuro kun nodoj je egalaj interspacoj.
<i>oblikva velo</i>	velo je stajo laŭlonge de ŝipo anstataŭ laŭlarĝe samkiel jardvelo
<i>pinĉi la velon</i>	veliri je oblikva kontraŭvento
<i>rigo</i>	velekipaĵo super la ferdeko, ekz. mastoj, jardoj, bumoj kaj ŝnuroj.
<i>stajo</i>	ŝnurego kiu apogas maston oblikva antaŭen kaj suben
<i>stajvelo</i>	triangula velo sur maststajo
<i>tunaro</i>	maksimuma pezo de velŝipo inkluzive de kargo kaj tute.

## Kelkaj velŝipoj :

Barko	Ŝipo kun tri aŭ pli mastoj. La plej poŭpa masto, la postmasto, estas gafrigita kaj la aliaj mastoj estas jardigitaj. Oni povas ŝipiri barkon kun pli malgranda ŝipanaro ol sur plenrigita ŝipo kaj je oceantrafiko ĝi estas konsiderinde pli bona ol skuno. La titolo devenas de la itala vorto "barca" kiu signifas "boaton".
Brigo	Dumastita velŝipo je tunaro eĉ ĝis 300 tunoj. Jardveloj je ĉiuj du mastoj krome gafvelo je la grandmasto. Facilvelita, manovrebla sur malgrandaj surfacoj. La titolo devenas de la itala vorto "brigantino" kie la vorto "briga" signifas "batalon".
Galeaso	La plej kutima tipo de ŝipetoj, dumastita oblikva velita kun gafvelo kaj topvelo. La antaŭa masto estas grandmasto. Ĉe longa kapstango aŭ ĵib-bumo povas esti uno aŭ du ĵiboj.
Skuno	Oblikva velita rigo kun gafveloj kaj gaftopvelo je ĉiuj mastoj, du aŭ pli. Uno el la plej grandaj velŝipoj en la mondo, Thomas W. Lawson, havis sep mastojn. La skunoj estis la plej bonaj velŝipoj je veliro per pinĉitaj veloj kaj je boardo. Kelkfoje oni havis jardvelon plej sube je la antaŭmasto, kelkfoje oni havis topjardvelojn je uno aŭ pli mastoj. Ĉiuj tipoj de skunoj havas stajvelojn por antaŭveloj.



Barko



Galeaso



Brigo

# Ni Hisu La Velojn

Teksto kaj muziko de la kantgrupo Kajto el Nederlando.  
En Pollando ni lernis ĝin dum "Esperanto sur la strando".

Subiris jam la luma sun',  
La ŝipo laca dormas nun.  
En la haveno post vojaĝ'  
Ripozas nun la ekipaĵ'.  
Maristoj tra la stratoj vagas  
Dum aliaj brandon pagas  
Kaj post plezura aventur'  
Jen ŝipen ili kantas nur:

Rekantaĵo:  
Ni hisu la velojn, ĉar blovas la vent'  
Finfine ni foriru en ĝusta moment'  
Ni kuraĝas forveli, esper' en la kor'  
La ŝip' estas preta, ni iru nun for!

Post longa nokt' en luna lum'  
Kaj tro facila amindum',  
La viroj nun kun iluzi'  
Dormante pensas nur pri ŝi,  
Sed frumaten' retrovas sin  
Forgesita jam la karulin'.  
Ĝojigas nur la vent' de la mar'  
Ekkantas jam la maristar':

Rekantaĵo:  
Sur ŝaŭma akvo velas ĝi  
Kun vasta maro antaŭ si.  
Fidinda por la maristar'  
Ĝi estas hejmo sen kompar'.  
Neniu loko sur la ter'  
Plibonas kontraŭ la mizer'.  
Mildiĝas bona akra sent'  
Forigas ĝin la mara vent'.

Rekantaĵo ... (du fojojn)


Kantu kun Kajto: <https://www.youtube.com/watch?v=9Ylse9mDYts>





# Esperanto-Sabato 18 majo. Inga Johansson informas

pri societoj, kun kiuj ni havas aŭ eble havos kontakton.



Ne estas kutimo, ke ni dum la sama monato havas du Esperanto-Sabatojn. Okazis en majo, kiam Inga traktis kvin "asociojn":

1. Fredens Hus – La Paca Domo
2. NBV – Nykterhetsrörelsens Bildnings-Verksamhet – La kleriga asocio de la kontraŭ-alkohola movado
3. "Care to translate"
4. Fandado
5. Språkförsvaret – La defendo de nia lingvo

**1. Fredens Hus** estas "kuniga asocio" por paclaboro. Ĝi serĉas propran ejon, kie eble ankaŭ ni povus havi aktivecojn. La Gotenburga klubo membras en Fredens Hus kaj Inga membras en la estraro de Fredens Hus. Kursoj pri konfliktraktado troviĝas en la programo kaj oni aparte turnas sin al lernejoj, kie oni laboras kontraŭ tiranado de kamaradoj.

Ingegerd streĉis, ke "egalrajtoj de la leĝo" gravas. Religiaj reguloj neniam povas anstataŭigi la svedan leĝon.

Sekvis diskuto pri mallongigoj kiel **UEA**, **SAT**, kaj **KER**. Unue, kion ili signifas? UEA – Universala Esperanto Asocio, kaj ĝi estas ja sufiĉe konata. **SAT** signifas Sennacia Asocio Tutmonda. Temas pri laborista asocio. La revuo de la sveda sekcio nomiĝas *Arbetaresperantisten*.

Sed oni eble ne nomas sin "satano" – ĉar tiu vorto ja signifas "diablo".

**KER (= Komuna Eŭropa Referenckadro)**... temas pri ekzamenoj pri Esperanto. Estas la samaj reguloj por Esperanto-ekzameno kiel por aliaj lingvoj en la Eŭropa Unio. Post plurjara kunlaboro, en kiu **edukado.net** havis gravan rolon, en decembro 2008 UEA lanĉis novan internacian ekzamsistemon de Esperanto, kiu konformas al la postuloj de la Konsilio de Eŭropo kaj difinas lingvokonajn normojn. La novaj ekzamenoj de UEA laŭ la

Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) nun estas ellaboritaj (el la 6 ekzistantaj) en niveloj **B1, B2** kaj **C1**. La akreditigo kaj funkciigo de la sistemo okazis kunlabore kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ORIGO) en Budapeŝto, kie Esperanto troviĝas inter la ŝtate rekonataj fremdaj lingvoj kaj kadre de ties ekzamensistemo havas la samajn rajtojn kiel la aliaj fremdaj lingvoj. Plurmil kandidatoj estas testataj ĉiujare en la menciitaj niveloj en la t.n. dulingva (hungara-esperanta) versio de la lingvaj ekzamenoj.

La fakto, ke la nova ekzameno konstruiĝis baze de la eŭropaj normoj, signifas, ke ties atestilon oni oficiale agnoskas kaj traktas kiel la aliajn lingvoekzamenajn diplomojn.

SAT havis kongreson en Gotenburgo en 1976 kaj UEA havis Universalan kongreson (UK) ĉi tie en 2003.

Inga parolis pri lingvo-kafejoj. La ĉefa celo de Lingvokafejoj estas ebligi al enmigrintoj evoluigi sian konon pri la sveda. Sed ankaŭ aliaj lingvoj havus lokon en la kafejoj. Se oni

studas ekz. la francan oni povas iri al la Lingvokafejo de Esperantoplatsen kaj trovi gvidanton kaj kunulojn kiuj parolas la francan pli – malpli bone. Kompreneble ankaŭ Esperanto povus esti lernebla lingvo en la lingvokafejoj.

En pluraj bibliotekoj troviĝas lingvokafejoj. En Tuve – norda parto de Gotenburgo – ankaŭ troviĝas "Ta i hand" – Uzu manon Aludas kaj al komunikado kaj al manlaboro. La bibliotekoj estas neŭtralaj koncerne al la diversaj studrondaj asocioj.

Sekvis paroliga tasko – ekz.

Mi estas ĝoja kiam .....

Mi koleras kiam .....

Mi estas kontenta, kiam .....

Mi sentas min tro uzita kiam .....

Mi pensas ke ne estas ĝuste kiam ..... k.t.p

Eble ni pli bone konis unu la alian post tiu ekzercado – kompreneble en Esperanto.



*Kelkaj el la 11 partoprenantoj*

**2. NBV** – Tiu studronda asocio estas la sola studronda asocio kiu havas informon en Esperanto. La lingvo ne estas korekta, sed tamen ni donu aplaudon al NBV

Memoru la admonon de Renate Corsetti: "Gardu la komencantojn".

Jen parto de la esperanto-informo de NBV: *Ĉu vi volas komenci la studon cirklo?*

*Ĉu vi, viaj amikoj aŭ via klubo lernas ion novan kune? Lasu viajn detalojn, ni kontaktos vin kun pli da informo pri kio helpo ni povas proponi al vi ke vi rapide kaj facile komencu vian studo cirklo.*

Ĉarma provo uzi Esperanton, ĉu ne? Ankaŭ NBV povus pruntedoni al ni studlokalojn.

**3. Care to translate.** Inga demandis ĉu ni iam estis en hospitalo eksterlande kaj ne povis komprenigi al la doktoro aŭ flegistino, kio mankas al vi. Jes kelkaj havis tiun sperton. Antaŭ la interreta revolucio oni provis fari praktikan frazlibrojn en kelkaj lingvoj pri "hospitalaj vortoj." Nun oni lanĉas helpilon en mobiltelefonoj. En hospitaloj kaj flegcentroj oni povas uzi ĝin. Tiel la flegado estos pli bona por pacientoj, kiuj havas lingvon, ne konatan de la flegistoj.

**4. Fandado** estas restoracio en Stokholmo (en Sveavägen 41) kun la menuo en

Esperanto. Ili elektis la esperantan nomon por montri ke ili ne havas nur manĝaĵon de specifa kulturo, sed de la tuta mondo.

**5. Språkförsvaret** – la Lingva Defendo – ofte reagas al la uzo de la angla en situacioj kiuj ne postulas tion. Nun estas elektadafiŝoj, kiuj havas la tekston: "Make EU lagom again!" Kial svedaj voĉdonantoj bezonas la anglan por EU-elekto? La angla baldaŭ ne havos tiom da homoj en EU, kiuj havas la anglan kiel gepatran lingvon – post Brexit. Kial oni ne lernas la germanan kaj la francan en la lernejoj? – Almenaŭ ne sufiĉas por ke la komercaj entreprenoj havu dungitojn kun pliaj fremdaj lingvoj ol la angla.

..... kaj kial oni ne lernas Esperanton – kiu estas "la moderna latino" – la komuna denominatoro por EU?

/ Siv

## Esperanto för alla!

poemo de Monica Eissing

Förbrödning och vänskap lyser fram i gruppen  
Att resa med ett grönt språk  
Ett språk utan krusiduller  
Det är ett språk för världens folk  
Inga barriärer för folk gällande raser, religioner  
och funktionsnedsättningar  
Folk har rätt att få vara den man är

Interfratiĝo kaj amikeco brilas en la grupo  
Vojaĝi kun verda lingvo  
Lingvo sen ornamaĵoj  
Estas lingvo por homoj de la mondo  
Neniuj barieroj por homoj, koncerne raso, religioj kaj handikapoj  
Homoj havas rajton esti kiel oni estas



[https://img4.custompublish.com/getfile.php/2110507.2014.erqtdsepxw/600x0/5826035\\_2110507.png](https://img4.custompublish.com/getfile.php/2110507.2014.erqtdsepxw/600x0/5826035_2110507.png)



## La konsila tago de lingvoj – Språkrådsdagen 2019



*Sur la bildo sidantaj: Kielo Bengtsson, Pirkko Loippo kaj Andreas Nordström. Starantaj Ingegerd Granat kaj Inga Johansson. Fotis: Siv Burell*

Kiel parto de nia volo havi kontakton kun reprezentantoj de la minoritataj lingvoj, la finna estis en vico. Dank'al Soile Lingman ni havis kontakton kun la Gotenburga Asocio por Finnaj Militinfanoj.

Ni renkontis du el la estraranoj, la prezidanton **Kielo Bengtsson** kaj la estraranon **Pirkko Loippo** dum la tago de Lingvaj Konsiloj la 26-an de aprilo.

Inter 1939 kaj 1945 tri militoj trafis Finnlandon. Kun la preteksto ke Finnlando pafis al vilaĝo ĉe la landlimo, Rusio atakis Finnlandon la 30-an de novembro 1939. Komence la Karela terkolo estis atakita. La tiel nomata Vintra Milito estis fakto.

La infantransportoj al Svedio komenciĝis per boatoj, trajnoj kaj aviadiloj. La 13-an de marto en 1940 la Vintra Milito finiĝis.

Som ett led i vår önskan att ha kontakt med representanter för minoritetsspråken, var det nu finskans tur. Tack vare Soile Lingman fick vi kontakt med Göteborgsföreningen för finska krigsbarn.

Vi träffade två av styrelseledamöterna, ordförande Kielo Bengtsson och ledamoten Pirkko Loippo under språkrådsdagen den 26 april

Finland drabbades mellan 1939 och 1945 av tre krig. Under förevändning att Finland skulle ha beskjutit en gränsovertredelse anfaller Ryssland Finland 30 november 1939. Det började med ett anfall på Karelska näset. Det s.k. Vinterkriget var ett faktum.

Barntransporterna till Sverige börjar. De sker med båt, tåg och flyg.

Den 13 mars 1940 är Vinterkriget slut.

La 26-an de junio 1942 la daŭriga milito startis inter Sovet-Unio kaj Finnlando. Finnlandon, kiu kunlaboris kun Germanio, Rusio devigis elpeli la 200.000 germanojn, kiuj troviĝis en la lando, antaŭ ĉio en la norda parto.

La germanoj, kiujn oni komence kredis helpantoj kontraŭ Sovet-Unio, bruligis la finnan Laponion, kaj la loĝantojn, ĉirkaŭ 60.000, oni forkurigis al Svedio.

La 19-an de septembro 1944 estis armistico inter Finnlando kaj Sovet-Unio. En aprilo 1945 la lastaj trupoj forlasis Finnlandon. La 8-an de majo 1945 la milito en Eŭropo finiĝis. Pli pri tio oni povas legi en la libro **"Den stora barnevakueringen 1939 – 1945"** eldonita de la Landa Asocio por Finnaj Militinfanoj en kunligo kun la 25-a jubileo de la fondiĝo de la asocio.

Entute ĉirkaŭ 70.000 infanoj estis senditaj al Svedio. Iliaj gepatroj estis precipe finnparolantaj, sed malmultaj estis svedlingvaj finnoj.

Ĉirkaŭ 5000 neniam revenis al Finnlando sed adoptiĝis de siaj svedaj familioj aŭ restis en Svedio laŭ interkonsento kun la biologiaj familioj.

En Gotenburgo estis fondita la Asocio Gotenbarga por Finnaj Militinfanoj, en 1992. Ekde 2008 **Kielo Bengtsson** estas la prezidanto de la asocio. En la estraro estas ankaŭ **Pirkko Loippo**. Ambaŭ vizitis nin la 26-an de aprilo.

Unue Kielo rakontis kiel ŝi kvinjara iris per boato de la hejmurbo Turku (Åbo) al Stokholmo. Neniam antaŭe ŝi iris per boato. La jaro estis 1942. Kompreneble ĉiuj nekonataj sonoj timigis ŝin. Ŝi jam promesis al sia patrino bone prizorgi sian fratineton, sed la finnajn infanojn oni metis en trajnojn kaj pro tio ili estis lokigitaj en tuta Svedio. Ofte oni disigis gefratojn. Eĉ ĝemeloj estis disigitaj.

Den 26 juni 1941 startar Fortsättningskriget mellan Sovjetunionen och Finland.

Finland, som har samarbetat med Tyskland, tvingas av Ryssland driva ut de 200 000 tyskar, som finns i landet, främst i den norra delen.

Tyskarna, som från början setts som en hjälp mot Sovjet, bränner ner finska Lappland och befolkningen på ca 60 000 drivs på flykt till Sverige.

19 september 1944 blir det vapenstillestånd mellan Finland och Sovjetunionen.

I april 1945 lämnar de sista tyska trupperna Finland. Den 8 maj 1945 är kriget slut i Europa.

Mer om detta finns att läsa i **"Den stora barnevakueringen 1939.- 1945"** utgiven av Riksförbundet Finska Krigsbarn i samband med 25-årsjubileet av föreningens bildande.

Sammanlagt skickades cirka 70 000 barn till Sverige Deras föräldrar var finsktalande, medan en mindre del talade finlands-svenska.

C:a 5000 återvände aldrig till Finland, utan blev adopterade av sina svenska familjer eller stannade i Sverige efter överenskommelse med de biologiska föräldrarna.

I Göteborg grundades Göteborgs Finska Krigsbarnsförening 1992. Sedan 2008 är Kielo Bengtsson ordförande i föreningen. I styrelsen finns också Pirkko Loippo. Båda besökte oss den 26e april

Först berättade Kielo om hur hon som fem-åring åkte båt från hemstaden Åbo till Stockholm. Hon hade aldrig tidigare åkt båt. Året var 1942. Hon var förstas rädd för alla okända ljud. Hon hade lovat sin mamma att ta väl hand om sin lillasyster, men de finska barnen sattes på tåg och spreds över hela Sverige och ofta skiljde man syskon åt. T.o.m. tvillingar separerades.

Kielo venis al la vilaĝo Hanna inter Simrishamn kaj Ystad. Ŝia skania dialekto restis ankaŭ post pluraj jaroj en Finnlando. Ŝia eta fratino venis al alia vilaĝo.

Kielo rigardis sian samaĝan svedan "fratinon" Elsie, kiel sian fratino pli ol sian veran fratino. Kielo ne bone memoras ilian unuan renkonton. Sed Elsie memoras, ke ŝi regalis Kielon per bonbonoj.

Kielo frekventis lernejon en Svedio dum ĉirkaŭ tri jaroj – sed ŝia fratinetto ne faris. Oni kredis, ke la milito baldaŭ finiĝus.

Nur en 1946 estis tempo reveni al Finnlando. Kielo jam enradikiĝis en Skanio. Ŝi ĵus komencis la kvaran klason kaj tute ne volis iri hejmen al Finnlando.

Ŝi jam forgesis la finnan. Sed en Turku (Åbo) ŝi povis frekventi svedlingvan bazan lernejon Cygneus. Malgraŭ tio estis problemoj, ĉar ŝia svedparolanta finna instruistino havis malfacilecon kompreni la skanian dialekton de Kielo. Poste ŝi frekventis la gimnazion. Dum la ferioj ŝi iris al Hanna por vizito.

Kiam Elsie kaj Kielo fariĝis 20-jaraj, oni aranĝis feston. Kielo estis invitita. Dum la festo Kielo renkontis junulon, kiu igis ŝin denove ekloĝi en Svedio. Iom post iom ŝi preskaŭ forgesis la finnan. Sed pli, Kielo trejniĝis la finnan per kursoj.

Pirkko poste estis en vico rakonti. Ni esperas skribi pli pri Pirkko en venonta Ora Ĵurnalo, ĉar la tempo rapide foriris, kaj miaj notoj estas malfacile legeblaj.

Ŝia destino ne estis same pozitiva kiel tiu de Kielo. Ŝi naskiĝis en Helsingfors (Helsinki), sed la familio translokiĝis al Jyväskylä. La gepatroj divorcis. La patro venis al la fronto.

Unue en aŭgusto 1944 Pirkko venis al Svedio. La finnaj infanoj venis al specialaj lokoj, kaj svedoj per telefono "mendis" ilin. Tio estis la sorto de Pirkko. Dum kelkaj monatoj ŝi troviĝis en infanhejmo. Tien venis svedoj kiuj

Kielo kom till byn Hannas mellan Simrishamn och Ystad och hennes skånska dialekt finns kvar även efter ett antal år i Finland. Hennes lillasyster kom till en annan by.

Hennes jämnåriga svenska syster Elsie kom att mer kännas som en syster än Kielos biologiska syster. Kielo minns inte så mycket av deras första möte, men Elsie mindes att hon hade bjudit Kielo på karameller.

Kielo gick i skola i Sverige under drygt tre år – medan hennes biologiska syster inte gjorde det..

Man trodde att kriget snart skulle ta slut.

Först 1946 var det dags att återvända till Finland. Kielo hade rotat sig i Skåne. Hon hade just börjat i fjärde klass och ville alls inte hem till Finland.

Hon hade glömt finskan. I Åbo fick hon gå i en svenskspråkig skola, Cygneus folkskola.

Ändå kunde det bli språkproblem, då hennes finlandssvenska lärare hade svårt att förstå

Kielos skånska dialekt. Sedan fortsatte Kielo i läroverket. På loven åkte hon och hälsade på i Hannas.

Då Elsie fyllde 20- liksom Kielo – ordnades en fest. Kielo var bjuden. Där träffade hon en pojke, som fick henne att åter bosätta sig i Sverige.

Med åren försvagades finskan och som vuxen har Kielo tränat upp sin finska på kurser.

Så var det Pirkkos tur att berätta. Vi hoppas på mer av Pirkko i nästa nummer, för tiden gick alltför snabbt och mina anteckningar är svårtydda.

Hennes öde var kanske inte lika positivt som Kielos. Hon föddes i Helsingfors, men familjen flyttade till Jyväskylä. Föräldrarna skildes.

Pappan kom till fronten.



ekzamenis la infanojn kaj montris al kiuj ili volis preni hejmen. La infanoj, kiujn neniu volis kunpreni, venis al diversaj infanhejmoj.

Por Pirkko ĉio kio memorigis ŝin pri Finnlando estis detruita, ankaŭ ŝiaj belaj vestoj kiujn ŝia patrino, la kudristino, kudris.

Pirkko venis al la insulo Brännö kaj la "Amerika-huset". La intenco estis, ke Pirkko dum la somero iros al la insulo Styrösö, sed ĉar la insulo estis malpermesita zono, kaj oni opiniis ke la knabino estis eksterlandano, ŝi ne povis iri tien. 18-jara oni elĵetis ŝin de ŝia sveda hejmo pro io, kion ŝi faris.

Sed kunulino helpis ŝin trovi loĝejon en Gotenburgo. Pirkko ekhavis laboron kiel zorgantino en la malsanulejo Sahlgrenska.

Pirkko volis poste revidi sian patron en Finnlando kaj iris tien. Ŝi renkontis sian onklinon. Grandaj lingvaj problemoj! La finnan Pirkko ne plu konis, sed feliĉe ŝia kuzo Eero scipovis la svedan, ĉar li jam praktikis en etbieno en Svedio.

Pirkko rakontis ankaŭ pri dancofesteno, kie ŝi renkontis viron kun malhelaj okuloj. Li instigis ŝin resti dum la somero. Sed ŝi revenis al Svedio kaj daŭrigis trejni la finnan ĉi tie.

Multaj nuntempaj svedaj pensiuloj memoras finnajn militinfanojn, kiuj eble estis najbaroj aŭ iliaj lernejar kamaradoj.

Mi mem memoras kiam Taisto venis al nia eta lernejo en Ilnestorp sur Linderödsåsen (longa altaĵo) en Skanio. Komence li estis tre silentema – ne strange – li ankoraŭ ne havis tempon lerni la svedan. Sed dum la paŭzoj oni rimarkis lin. Li estis rapida dum pilkludoj, kaj se li vetkuris kun iu, li ĉiam venis la unua.

Kio okazis poste, mi ne scias, ĉar mi translokiĝis kun mia familio al Södra Sallerup ekster Malmö /Siv

Först i augusti 1944 kom Pirkko till Sverige. De finska barnen kom till uppsamlingsläger och beställdes "per telefon" av svenskar.

Så var det också för Kielo, som under några månader befann sig på ett barnhem. Dit kom svenskar, som granskade barnen och pekade ut dem de önskade ta med sig. De som inte blev valda kom till olika barnhem.

För Pirkko förstördes allt som påminde om Finland, också hennes vackra kläder, som hennes mamma sömmerskan hade sytt.

Pirkko kom till på Brännö och "Amerikiahuset" På sommaren var det meningen att hon skulle till Styrösö, men eftersom ön var ett skyddsområde, betraktade man flickan som utlänning och hon fick inte åka dit,

Som 18-åring slängdes Pirkko ut från sitt svenska hem för något hon gjort.

En kompis ordnade boende i Göteborg. Pirkko fick arbete som vårdbiträde på Sahlgrenska.

Pirkko ville senare återse sin pappa i Finland och åkte dit. Där träffade sin faster. Stora språkproblem! Finska kunde inte Pirkko, men kusin Eero kunde lyckligtvis svenska, sedan han praktiserat på ett småbruk i Sverige.

Pirkko berättar vidare om en dans-tillställning, där hon träffade en mörkögd man, som fick henne att stanna kvar under sommaren. men hon återvände till Sverige och fortsatte att träna finska här.

Många av dagens svenska pensionärer har minnen av finska krigsbarn, som kanske var deras grannar eller skolkamrater eller deras grannar.

Själv minns jag när Taisto kom till vår lilla skola i Ilnestorp på Linderödsåsen i Skåne.. Han var väldigt tyst i början – inte att undra på – han hade ju inte hunnit lära sig svenska. Men på rasterna märktes han. Han var snabb



**Pentti** estis sepjara kiam sovetaj milit-aviadiloj komencis superflugi sian hejmon en Karelio. la 30an de novembro en 1939 Sovetunio atakis Finnlandon sen militdeklaro.

La familio fuĝis en la arbaron, sed la tieaj loĝantoj ne bonvenigis refuĝintojn, tial ili reiris hejmen.

Sed baldaŭ ili denove devis fuĝi. Estis ja vintro, kaj ili vestis sin per varmaj vestoj kaj foriris per sledo. Kio okazis al la bovinoj li ne scias Eble la patro buĉis ilin antaŭ la forveturo. Aliaj familioj igis la bovinojn kuniri en la neĝo.

Pentti endormiĝis en la sledo kelkajn fojojn. La familio alvenis al fervoja stacio. Por la unuan fojon Pentti vidis trajnojn. Estis nur vartrajnoj. Daŭris ĝis li ekvidis pasaĝertrajnojn.

Sur unu el la bildoj, kiujn Pentti montris, estis la blazono de Karelio. Ŝajne ĝi estis simbolo por la geografia situo de Karelio inter du

i bollspel och sprang han ikapp med någon, kom han alltid först.

Hur det gick för honom vet jag inte, för jag flyttade med min familj flyttade till Södra Sallerup utanför Malmö. /Siv

## Pentti Käppi rakontas pri migradoj en Karelio

**Pentti Käppi berättar om folkförflyttningar i Karelen under de tre krig Finland utkämpade på 40-talet.**

Du el la Gotenbarga sekcio de la Societo de Finnaj Militinfanoj- vizitis nin la 26an de aprilo (artikolon en ĉi tiu numero). La 15an de majo kvar personoj el la Esperanto-Societo de Gotenburgo vizitis ilin kaj aŭskultis interesan prelegon de Pentti Käppi.

**Pentti** var sju år då sovjetiska krigsplan började flyga över hans hem i Karelen. Den 30 november 1939 anföll Sovjetunionen Finland utan krigsförklaring.

Familjen flydde in i skogen, men de som bodde där välkomnade inte flyktingar, så de återvände hem.

Men snart måste de fly på nytt. Det var ju vinter, och de klädde sig i varma kläder och gav sig iväg i släde. Vad som hände med deras kor, minns inte Pentti. Kanske slaktade hans far dem innan de åkte. Andra familjer lät sina kor vandra med i snön.

Pentti somnade i släden ett par gånger.

Familjen kom till en järnvägsstation. Det var första gången Pentti såg tåg. Det var bara godståg. Det dröjde innan han fick se ett persontåg.

På en av bilderna som Pentti visade fanns Karelens vapen. Tydligt var det en symbol

mondoj. Maldekstre estis kavalira glavo – la okcidenta mondo – kaj dekstre kurba sabro – la orienta mondo.

Dum la fuĝo ili povis resti iomete en la domo de onklo. Sed baldaŭ estis tempo rapide foriri denove.

Pentri memoras ke estis odoro de rizkaĉo en la forno, sed ili ne havis tempon gustumi ĝin.

La finna armeo uzis ”la taktikon de la bruligitaj domoj”. Pli volonte forbruligi siajn proprajn domojn ol lasi al la malamikoj eniri en varman domon.

El loĝantaro de 3,7 miljonoj en Finnlando, 500 000 estis evakuitaj, la plejparto dufoje. Proporcie al la nombro de la tuta loĝantaro okazis ja la plej granda translokado de popolo en Eŭropo en Finnlando.

Soveto decidis pri nova landlimo kaj kaptis duonon de Finnlando.

La patro de Pentti soldatservis ĉe la fronto. La patrino venis kun la kvin gefiloj al sinjorlando proksime al Tammerfors. Tie ŝi laboris kiel bestzorgisto kaj melkis la bovinojn. La loĝejo estis servista ĉambro. Ekstere povis esti 40 gradoj sub la zero. La manĝo konsistis ĉefe de kaĉo el aveno kaj acida lakto. Sed – estis elektra lumo – io, kion Pentti neniam antaŭe spertis en sia hejmo.

La sovetaj bombaviadiloj daŭre superflugis la domon. Foje aŭdiĝis eksplodo, kiam aviadilo estis subenpafita.

Helpsendoj venis de Svedio kaj la kvin infanoj ricevis novajn vestojn.

Per bateria radio oni provis havi Aktualan informon. Bedaŭrinde la elsendoj ofte estis supersonitaj de soveta propagando.

Tre agrabla adoleska fraŭlino loĝis en la sinjorlando. Danco estis malfermita dum la vintra milito, sed ŝi kaj aliaj gejunuloj tamen iris al dancejo sabate, kiam soldatoj foje havis liberan tempon.

för Karelens geografiska läge mellan två världar.

Till vänster var det ett ridarsvärd – västvärlden – och till höger var det en kroksabel – östvärlden.

Under flykten kunde de vila ett tag i huset hos en farbror. Men snart var det dags att snabbt bryta upp igen. Pentti minns hur det luktade gott från risgrynsgröt i ugnen, men de hade inte tid att smaka på den.

Den finska armén tillämpade ”den brända jordens taktik” Hellre bränna ner de egna husen än låta fienden komma in i ett varmt hus.

Av ett invånarantal på 3,7 miljoner i Finland blev 500 000 evakuerade, de flesta två gånger. I förhållande till hela folkmängden skedde alltså den största folkomflyttningen i Europa i Finland

Sovjet bestämde en ny gräns och tog halva Finland.

Penttis pappa var vid fronten. Mamman kom med

de fem barnen till en herrgård nära Tammerfors.

Där arbetade hon som djurskötare och mjölkade kor. Bostaden var en drängkammare. Ute kunde det vara under 40 minusgrader.

Maten bestod mest av havregrynsgröt och blåsur mjölk. Men det fanns elektriskt ljus, något som Pentti aldrig tidigare upplevt i sitt hem.

Sovjetiska bombplan flög hela tiden över huset.

En gång hördes en explosion, då ett flygplan blev nerskjutet.

Hjälpsändningar kom från Sverige och barnen fick nya kläder.



Pentti memoras ke antaŭ danc-sabato la junulinoj sidis sur seĝoj kaj estis kombitaj per pedika kombilo kaj la pedikoj falis sur litotukon sur la planko. Ankaŭ blatoj troviĝis en la domoj.

Pentti ankaŭ rakontos pri la lernejo. Per skioj li atingis la lernejon kvin kilometrojn for de la hejmo.

La instruistino faris fajron en la kameno kaj nur kiam la ĉambro estis sufiĉe varma la infanoj rajtis eniri. El 420 000 karelandoj ĉirkaŭ 90 000 infanoj venis al Svedio.

Pentti kune kun siaj kunuloj foje ludis danĝerajn ludojn. La plej danĝera estis kiam ili faris grandajn truojn en la fojno kaj eklumigis ilin per kandeloj.

Foje estis vera incendio.

En la intermilita periodo 13/3 1940 – 25/6 1941 oni provis rekonstrui la landon

Esti "kolonianoj" ne estis facila afero. Por ke la rusoj ne prenu ĉion, ili kaŝis ekz. maŝinojn kaj ilojn en la tero. La malnovaj domoj povis esti forbruligitaj kaj ili devis konstrui novajn.

La preĝejan sonorilon la paroĥo metis sur la fundon de lago, kaj la rusoj ne trovis ĝin

La rusoj pligrandigis la premon sur Finnlando. Germanio helpis Finnlandon per trupoj kaj armiloj.

La 30 julio en 1940 Germanio atakis Sovetunion kaj Finnlando. La kodnomo estis Operaco Barbarossa.

Novaj migradoj. Entute dum la tuta milito 70 000 infanoj venis al Svedio. Sed Pentti ne estis inter ili.

La rego en Finnlando disdonis teron de la grandaj bienoj por ke la malriĉuloj havu eblecon vivi tie.

Med hjälp av en batteriradio kunde man få aktuell information. Tyvärr överröstades sändningarna ofta av sovjetisk propaganda.

En mycket trevlig tonårss flicka bodde på herrgården. Dans var förbjuden under vinterkriget, men hon och andra ungdomar gav sig ändå iväg till dansställen på lördagarna, då soldater ibland hade ledig tid.

Pentti minns att inför en dans-lördag satt flickor på stolar och blev kammade med luskam och lössen föll ner på ett lakan på golvet. Också kackerlackor fanns i husen

Pentti berättade också om skolan. På skidor kom han till skolan, som låg fem km från hemmet.

Lärarinnan gjorde upp eld i kaminen och först när rummet var tillräckligt varmt fick barnen gå in.

Av 420 000 karelare var det ca 9000 barn som kom till Sverige.

Tillsammans med sina kompisar lekte Pentti ibland farliga lekar. Den värsta var när de gjorde stora gropar i höet och lyste upp dem med stearinljus. En gång blev det en riktig brand.

I mellankrigstiden 13/3 1940 till 25/6 1941 försökte man bygga upp landet igen.

Att vara nybyggare var inte lätt. För att inte ryssarna skulle ta allt, hade de t.ex gömt maskiner och verktyg i jorden. De gamla husen kunde vara nerbrända och de måste bygga nya

Kyrkklockan hade församlingen placerat på sjöbotten och den hittade ryssarna inte.

Ryssland ökade pressen på Finland. Tyskland hjälpte Finland med trupper och vapen.

Den 30 juli 1940 attackerade Tyskland Sovjetunionen och Finland. Kodnamnet var Operation Barbarossa.

En 1949 la familio de Pentti vivis en propra domo kaj naskiĝis pliajn infanojn. Entute nun estis ok gefiloj.

La domo ne estis tre moderna sed solide konstruita. Oni havis bovinojn, puton ekstere kaj kompreneble saŭnon.

